BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

MAIO/JUNHO 1982 BOLETIM INFORMATIVO Nº 70

## KUNLABORO – TOLEREMO

Jam de sufiĉe longa tempo ni ricevas de pluraj gesamideanoj el la tuta lando kritikojn pri la situacio de la brazila Movado. Kelkaj eĉ faras sugestojn kaj proponas solvon.

Sed, kion fari? Tio estas tre tikla problemo, kaj ĝia solvo ne dependas de unu sola E-organizo, despli de tiu aŭ alia esperantisto - eĉ la plej grava aŭ saĝa. Ĝi estas afero de la tuta brazila esperantistaro: de novaj kaj malnovaj, junaj kaj oldaj, de aktivuloj kaj ankaŭ de "dormantoj". Ĝian solvon oni atingos nur tiam, kiam la plimulto vere interesiĝos pri ĝi, kiam oni malkaŝe diskutos pri ĝi en kunvenoj, kiam oni interkonsentos pri specialaj tiucelaj debatoj.

Nu, BKE estas ĉiam malfermita al tia diskutado. Ĉe la kunveno okazinta en Juiz de Fora, prelegante pri ties temo mi transkribis el la ĉefartikolo de s-ro Robiolle publikigita en "Esperanto-Fervojisto", n-ro 352: "En nia epoko, estas agrable konstati, ke nombraj estas la kompetentaj homoj, kiuj agadas por nia idealo. Se d-ro Zamenhof povus vidi tion, li ĝojus; sed, verŝajne, li estus iom trista, vidante la misharmonion, kiu regas inter multaj bonvolemuloj, kies plimulto dediĉas preskaŭ sian tutan vivon al Esperanto. Unua-vide, tiu misharmonio estas malfacile komprenebla; ĉar, fakte, ĉiuj homoj, kiuj vivas por Esperanto, fortege deziras la venkon de nia lingvo! . . . malsamaj estas nur la proponataj metodoj". Kaj mi aldonis: Ĉar ni honeste konfesas, ke estas multo farenda por atingi la dezirindan harmonion, estu do nia devizo: KUNLABORO.

Belaj estas la vortoj ofte dirataj en oficialaj paroladoj. Sed en la koro, en la plej intima parto de ni mem, ĉu ni havas ĉiam la plej fratan senton? En nia ĉiutaga vivo, ĉu ni uzas ĉiam la plej grandan sincerecon? Ĉu ne estas en ni eĉ plej malgranda guto da koleriĝo, kiam oni atakas nin, kiam ni ne sukcesas venkigi nian opinion aŭ altrudi niajn starpunktojn?

Zamenhof mem diris en la Dua Kongreso (Ĝenevo/1906): "Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn". En la supre citita ĉefartikolo ni povas plu legi: "Se li povus reveni inter ni, Zamenhof verŝajne gratulus varme tiujn homojn, kiuj tiom multe agas por Esperanto; sed, ankaŭ, verŝajne, li aldonus: Vi jam multe faris por nia lingvo; sed vi povas ankoraŭ fari multe pli, sen plua penado, se vi respektus la simplan konduto-regulon: ESTU TOLEREMAJ!"

Nelson Pereira de Souza

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31, Ap. 73, BR 11100 - Santos - SP.

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 01 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SOS 306-A 101,BR 70353-Brasília-DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**

Oficiala organo planita por monata apero.

Dissendo senpaga

**Redaktoroj provizoraj:** Carlos A. S. Cunha kaj Nelson P. de Souza

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

## MONDONACOJ POR LA BULTENO

Al la subaj bonkoraj batalantoj ni dankas la monhelpojn ricevitajn dum aprilo 1982:

| | |
|---|---|
| Ary Zamora . . . . . . . . . . | Cr$ 800,00 |
| Cláudio Zimmermann . . . | Cr$ 300,00 |
| Francisco de S. Almada . . | Cr$ 500,00 |
| Johano Puigvert Vieta . . . | Cr$ 500,00 |
| Lacorday Andrade . . . . . | Cr$ 250,00 |
| Luiz Antonio Loyola . . . . | Cr$ 250,00 |
| Marcelo V. de Andrade . . | Cr$ 1.000,00 |

## 8-a SAN-PAŬLA ESPERANTO-RENKONTIĜO

Ĉirkaŭ 150 homoj venintaj el 20 urboj partoprenis en la 8-a San-Paŭla Esperanto-Renkontiĝo, organizita de Esperanto-Asocio kunlabore kun la Sekretariejo pri Kulturo de São José dos Campos.

La 29-an kaj 30-an de majo, multaj el la loĝantoj de tiu bela urbo havis okazon aŭdi ion pri la Internacia Ligvo Esperanto.

La tri ĉefaj brazilaj Esperanto-organizoj tre bone reprezentiĝis en la evento: BKE - Carlos Augusto Siqueira da Cunha, Nelson Pereira de Souza (veninta el la tre fora urbo Brazilio) kaj Francisco de Souza Almada (Santos); BEL - Alan Romero; KKE - Amarílio H. Carvalho, kiu sukcesis organizi grandan karavanon de la ŝtato Rio-de-Ĵanejro.

Estis ankaŭ reprezentitaj: Sorokaba Esperanto-Klubo, Esperanto-Societo de Bauru, Esperanto-Asocio de Promissão, Associação Mogiana de Esperanto, "Verda Stelo" Esperanto-Societo, Esperanta Klubo "Zamenhof", Esperanta Grupo "Adolfo Bezerra de Menezes" kaj Associação Esperantista do Rio de Janeiro.

Prestiĝis la Renkontiĝon la Deputitoj Freitas Nobre kaj Robson Marinho, prof. Osvaldo Sangiorgi, direktoro de la Departamento pri Kulturo de la Fondaĵo "Padre Anchieta" (ETC) kaj la urba san-paŭla konsilante Altino Lima, kiu sendis reprezentanton.

Altnivelaj paroladoj, tradukada konkurso, du ekzpozicioj (unu pri pentraĵoj de Marija Pozder Almada, alia pri la Esperanto-movado, organizita de majoro Gilberto Aquino da Silva Velho), kultura ludo (gvidita de Ivon Barbosa) konsistigis la programon. Nur unu junulo kandidatiĝis al la citita konkurso: Benedito de Paula. Juĝis lian tradukon José Dias Pinto kaj Paulo Sérgio Viana.

La plej bona resulto de la Renkontiĝo estis fakte tiu, kiun deziris ĝiaj organizintoj, tio estas - la implanto de Esperanto-movado en la Paraiban Valon. Kelke da izolaj esperantistoj de tiu regiono decidis kunveni almenaŭ ĉiun dumonaton cele al la disvastigo de Esperanto.



## TRA LA MONDO

• REVUO ESPERANTO - La oficiala organo de UEA, n-ro 917 (majo/82), publikigas estrar-raporton kun multaj kaj afablaj alludoj al Brazilo kaj fotoj de la 66ª UK. La brazila esperantistaro ne povas do perdi la rekordan pozicion atingitan en 1981 (vidu nian bultenon n-ro 68).

• GRÉSILLON - La famkonata kastelo en Francio regule funkciigas internaciajn E-kursojn; krome, de la 4ª/11ª aprilo okazigis la 8an Internacian Printempan Semajnon kaj pedagogiajn debatojn de geinstruistoj laŭ aranĝo de ILEI. Tiu Kulturdomo estas tre taŭga por allogi brazilajn ne-esperantistajn turistojn en regule organizitaj turnvojaĝoj.

• KONKURSO PRI JUBILEA SIMBOLO - Laŭ la agad-programo de UEA, la movado bezonas taŭgan simbolon por la 100-jara jubileo; tial ĝi starigis konkurson. Rajtas partopreni membroj kaj ne-membroj de UEA. Limdato estas la 31ª/decembro/1982; premio 1.000 guldenoj. Sendu konkursaĵojn al: Centra Oficejo - Nieuwe Binnenweg 176 - 3015 BJ Rotterdam - Nederlando.

• AŬSTRALIA KONGRESO - La fakto ke ĝin malfermis la Vic-Guberniestro mem atestas kaj la progreson de Esperanto en tiu lando kaj la kreskantan apogon de aŭtoritatuloj al nia Movado. Espereble oni kaptos la okazon de la Jubileaj Festoj por pli altaj atingoj en la tuta mondo kaj ĉefe en Brazilo, kie estas jam longa tradicio tiurilate.

• ESPERANTOTUR - (Str. M. Sklodowskiej-Curie 10 - PL 85-094 - Bydgoszcz - Pollando) La Turisma Servo de UEA kaj de TEJO, kune kun Monda Turismo, E-Ferioasocio de Britio kaj turka agentejo ÇAG TURIZM, havas vojaĝplanojn por la tuta jaro. Mankas nur ke la brazila esperantistaro uzu tiun reton . . .

• RADIO "POLONIA" (Esperanto-Redakcio - Poŝtkesto 46 - PL 00-950 - Varsovio) - En la 4ª/aprilo festis sian 23an datrevenon kaj ekde la 3ª/majo elsendas kvinfoje ĉiutage!

• ESPERANTO-TEATRO - Budapeŝto fariĝis la ĉefurbo de E-kulturo dum la Internacia Renkontiĝo de E-Teatroj, en la 19ª/28ª marto ĉi-jare - 10 tagojn! - kiel konstateblas laŭ grandaj raportoj en "Esperanto", "Heroldo" k.a. Rim.: Kiel la brazila E-teatro? Ni uzu la potencialon de oficiala apogo por imiti Budapeŝton, kie la Hungarlanda Turisma Oficejo iniciatis - kaj financis! - enkadrigi la menciitan Renkontiĝon en la Printempan Festivalon, konforme al rekomendoj de Monda Turisma Konferenco en Manilo/1980.

• INTERNACIA E-KURSEJO (Poŝtkesto 791 - 1090 Sofio - tel.: 43-1362) - Ankoraŭfoje pri turismo ankaŭ por ne-esperantistoj. Treege varia programo kun sportludoj, ekskursoj, diafilmoj - novjara balo! -kaj . . . kompreneble kursoj.

• CONFEDERACIÓN ESPIRITISTA ARGENTINA (Sanchez de Bustamente 463 - 1173 - Buenos Aires) - Okazigas E-kurson ĉiun ĵaŭdon, la 19an horon. Evidentiĝas ke ne nur en Brazilo la spiritisma movado apogas Esperanton, sed ankaŭ en aliaj sudamerikaj landoj fruktodonas la dissemado de Brazila Spiritisma Federacio, Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, SEI (Lar Fabiano de Cristo) k.a.

*Participe ativamente do Movimento Esperantista Brasileiro, filiando-se ao Clube de sua cidade ou a uma das seguintes organizações nacionais: BEL, KKE, BEJO, IEE ou BKE. O Brasil precisa de Você!*




## LETEROJ RICEVITAJ

- *Mi devas diri, ke nia restado en via lando multe helpis al ni dum la pasinta periodo. Via juneca, optimista viv-maniero lernigis al ni solvi niajn problemojn pli bone, ol la peza "eŭropa" maniero. Ofte ni kun ĝojo memoras la tagojn en via bela sunbrila Lando (Ges-roj HAMMER, Nederlando).*

- *En la momento, kiam la Ĉambro de Deputitoj rekonas la forton de Esperanto, mi ne povas resti indiferenta, ĉefe pro tio ke oni vokas min por helpi . . . Tiun alvokan oni diskonigu tiel, ke ĉiuj estu pretaj fari sian kontribuon (Eléus Leonardo de Sá, Ilhéus-BA).*

- *Bonvolu transdoni mian adreson al geamikoj en Brazilo. Mi interesiĝas pri sporto, muziko, turismo. Mi kolektas ĉiulandajn bildkartojn, kaj mi ŝatos korespondi pri ĉiuj temoj (Bogusŝan Ubaniak - ul. Grenwaldzka 158/63, 60-309 Poznán - Pollando).*

- *Ni profitas la okazon por danki al la tuta estraro de via organizo la neatenditan aperigon de informoj pri kursoj gvidataj de BEL, en via akurata kaj bonega oficiala bulteno (Fernando José Galvão Marinho, elektita prezidanto de B.E.L. - RJ).*

- *Acusamos recebimento carta et informamos que estamos pleiteando Seção Esperanto biblioteca Câmara Pt cordialmente (Telegrama subscrito pelo Deputado Freitas Nobre, Segundo Vice-Presidente Câmara Deputados).*

## 66º CONGRESSO MUNDIAL DE ESPERANTO

### A V I S O


O Tesoureiro do Congresso (Carlos Augusto S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, CEP 04.068 - São Paulo-SP) informa que os congressistas abaixo são credores das seguintes importâncias, provenientes de pagamentos superiores às taxas de inscrição devidas na época:

| | | |
|---|---|---|
| Cesar Rodrigues Gomes . . . | Cr$ | 441,00 |
| João M.Aguilera Jr. . . . . . . | Cr$ | 247,00 |
| Angelina Caldeira Briski . . . | Cr$ | 247,00 |
| Sônia Mary Ribeiro . . . . . . | Cr$ | 738,00 |
| Davi José Silva . . . . . . . . . . | Cr$ | 177,00 |
| Humberto Leite Araújo . . . | Cr$ | 972,70 |
| Edson Palhares de Souza . . | Cr$ | 356,00 |
| Salvandyze A.F.de Souza . . | Cr$ | 840,00 |
| Yukio Hemerson Ito . . . . . | Cr$ | 266,00 |
| Geraldo Boz Jr. . . . . . . . . | Cr$ | 347,00 |
| Jorge Lúcio de Paula . . . . . | Cr$ | 228,00 |
| Idália de Freitas Lima . . . . | Cr$ | 1.060,00 |
| Marlene Chagas Paim . . . . . | Cr$ | 1.060,00 |
| Lígia Falavigna . . . . . . . . . | Cr$ | 1.060,00 |
| Maria Lourdes Rodrigues . . | Cr$ | 1.060,00 |
| Estevão de Luna Freire . . . | Cr$ | 1.051,00 |
| Martha Freire . . . . . . . . . . | Cr$ | 699,00 |
| Said P. de Albuquerque . . . | Cr$ | 633,30 |
| Cezar Ney H. Cordeiro . . . . | Cr$ | 1.193,00 |
| Magnólia P. Correia . . . . . . | Cr$ | 336,00 |
| Maria Estela A. Gadelha . . . | Cr$ | 840,00 |
| Lauro Jorge de Oliveira . . . | Cr$ | 1.156,00 |
| Oscar de Souza Mello . . . . | Cr$ | 860,00 |
| José Francelino Oliveira . . . | Cr$ | 840,00 |
| José Siquara da Rocha . . . . | Cr$ | 1.190,57 |
| Marcelo Figueiredo C.Rocha | Cr$ | 578,00 |
| Nidal K. Hazboun . . . . . . . | Cr$ | 556,00 |
| Marcelo Pereira da Silva . . . | Cr$ | 319,00 |
| Ivaldo Alves de Souza . . . . | Cr$ | 615,50 |
| Eduardo Ernesto P.da Costa | Cr$ | 342,50 |
| Maurício Santiago Couto . . | Cr$ | 860,00 |
| Helmuth Schenk . . . . . . . . | Cr$ | 1.210,00 |
| Wilma Martins Schenk . . . . | Cr$ | 812,00 |
| João Martins da Silva . . . . . | Cr$ | 1072,00 |

Contra apresentação de recibo assinado, do qual conste o nome do credor, seu número de congressita e seu endereço atualizado, o Tesoureiro do Congresso fará o respectivo pagamento, por cheque, a menos que o interessado deseje doar seu crédito, hipótese em que deverá declarar expressamente no verso do recibo, o nome da entidade beneficiária.

Os valores não reclamados até 31-08-82 serão contabilizados como renda do do Congresso, à ordem do escritório Central da UEA, em Rotterdam.

a) Carlos A. S. Cunha - Kasisto



EL LA GAZETARO

• O CRUZADO (R. São Valentim, 142 - 20260 R.Janeiro-RJ) - Oficiala bulteno de Cruzada dos Militares Espíritas raportas pri vizito al la eldonejo FONTO, en Chapecó-SC, kiun funkciigas s-ano Gersy A. Bays kaj familio.

• JORNAL DO SELO (Av. Rio Branco, 151, gr. 212 - 20040 R.Janeiro-RJ) - S-ano Alcino B. Beiriz en sia rubriko pri Numismatiko informis pri la monero "stelo" kaj ĝenerale pri Zamenhof kaj Esperanto.

• SUL DO ESTADO (Av. N.S. Amparo, 106 - 27180 Volta Redonda-RJ) - Raportas en la frontpaĝo per grandaj litertipoj pri la lastaj atingoj de E. ĉe la Ĉambro de Deputitoj.

• A CAMINHO DA LUZ (R. Machado de Assis, 211 - 27180 Volta Redonda-RJ) - Publikigis grandan artikolon pri la agado de Bahia esperantistaro dum la tie okazinta VII Kongreso de ĵurnalistoj Verkistoj Spiritistoj.

• VALE PARAIBANO (Estr. Velha Rio-São Paulo, 3755 - 12200 São José dos Campos-SP) - Aperigis grandan raportaĵon pri la 8ª Renkontiĝo de San-Paŭlo, okazinta en tiu urbo en la tagoj 29ª/30ª de majo lasta.

• S.E.I. (Rua dos Inválidos, 34 - 20231 R.Janeiro-RJ) - En la ĉiusemajna eldono nepre informas pri E-okazaĵoj interesantaj ĉefe la spiritistojn, el kiuj estas multaj esperantistoj en Brazilo. Rimarkinde estas, ke ĉiun duan monaton aperas esperanta eldono.

• REFORMADOR (Av. Passos, 30 - 20051 R.Janeiro-RJ) - Jam de pluraj jaroj en ĉiu monata numero aperigas artikolojn, poeziaĵojn k.a. en kaj pri E., konservante la tradicion kreitan de la neforgesebla pioniro Ismael Gomes Braga.

• CORREIO FRATERNO DO ABC (C. Postal 58 - 09700 S. Bernardo do Campo-SP) - Post kelkatempa interrompo reaperas rubriko "Esperanto" en kvaronpaĝo kun tre oportuna informado.

KAMPANJO - 250 INDIVIDUAJ MEMBOJ

Ĉiutage kreskas la anaro de BKE. Ni devas nun anonci, ke Laborgrupo Antaŭen (CGC 0065567/0001-46), el Brazilio, fariĝis nia membro en la kategorio "B", en 16-06.82. Kiel membroj individuaj lastatempe aliĝis: Lacorday Andrade, João de Oliveira Gama, Francisco Jurandir de Melo, Godofredo de Araújo Góes, Geraldo José Samary de Andrade, Alcyr Guedes de Almeida, Marcus Túlio de Almeida Flores, Maria José Pontes, Alcino Bourguignon Beiriz, José de Paiva Carvalho, Paulo Amorim Cardoso, Roniison Mendes Mota, Célio Freitas Martins, Ezequias Raimundo Alves e Francisco Carlos Couto de Moraes.

Al ĉiuj ni esprimas plej koran dankon kaj atendas, ke la nombro de niaj individuaj anoj kresku ĝis minimume 250 membroj, kio sufiĉus por subteni la eldonkoston de tiu ĉi Bulteno kaj la ceterajn administrajn kostojn de nia Organizaĵo.

Ĉu vi ne volas, kara leganto, imiti la suprajn ekzemplojn? Malgraŭ la inflacio, BKE-jarkotizo konservas sian antaŭan valuton: Cr$ 1.200,00 ĝis la fino de 1982.

*Você já se inscreveu para o Seminário de Esperanto en Uberlândia, patrocinado pela Cooperativa Cultural dos Esperantistas?*

# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## BAHIA

● **ILHEUS ESPERANTA KLUBO** C. Postal 72 - 45660 Ilhéus-BA) - Estas registrita kiel "Publika Utileco" (Lêgo 1188, de 05.06.78) kaj raportas pri konstanta agado jam de 28 jaroj, ĉefe pro la senlaca laboro de S-ano Eleus L. Sá.

● **ESPERANTA STUDGRUPO "ZAMENHOF"** (Praça Anchieta, 8 Terreiro - 40000 Salvador-BA) kreita ĉe la Spiritisma Federacio de Ŝtato Bahio faras grandan laboron en la urbo kaj ŝtato. En la marta-aprila numero de "Impacto" (oficiala organo de tiu Federacio) ĝi publikigas propagandajn frazojn pri E. kaj belan mesaĝon el la libro Kristana Agendo, de Andreo Ludoviko. Sekvinda ekzemplo por ĉiuj spiritistaj organizoj, kiel okazas ankaŭ en Brazilio.

## FEDERACIA DISTRIKTO

● **COMUNHÃO ESPÍRITA DE BRASILIA** (Av. L-2/Sul Q. 604 L. 27 - 70200 Brasilia-DF) - En ĝia sidejo funkcias Grupo "Zamenhof", gvidata de s-ano Dorini kaj F-ino Leda ambaŭ direktoroj de BKE. Tie regule okazas E-kursoj kaj baldaŭ oni disdonos flugfoliojn kun spiritismaj mesaĝoj.

● **DINAMIKA KURSO** - Novan tiaspecan kurson faris s-ano Nelson, nun en la sidejo de Tattwa Forças Mentais do Planalto (SHCES-1109 L. 1 - Cruzeiro Novo - 70650 Brasília-DF). En la komenco estis 15 gelernantoj, kaj en la fino 15.

● **MOMENTONI** - La tre bona BEJO-Bulteno (C. Postal 11-1110 - 70084 Brasília-DF) estas ĉiam pli kaj pli interesa kaj alloga. La laste ricebita nro. 7 enhavas interalie raporton pri vizito al Argentejo kiel preparo al la Unua TJR en Kolombio kaj alvokon pri E-instruado al infanoj. Gratulinda estas la kuraĝa artikolo "HA SE MI SCIUS . . ."

## MATO GROSSO

● **CUIABÁ** - Laŭ informo de s-ano Manoel Sisccati, el Ribeirão Preto, okazas num elementa kurso gvidata de D-ro BENEDITO MONTEIRO BORGES (R. Consolação, 237 Pge. Res. Copema, Coxipó - 78000 Cuiabá-MT). Gratulon!

## MINAS GERAIS

● **ESP.-KLUBO DE MONTES CLAROS** (a/c Academia Montes-Clarense de Letras - Praça Dr. Chaves, 32 - 39400 - Montes Claros-MG) - Ĵus fondiĝis kaj anoncas: "Sur la ĉielo de la nordo de Minas Gerais brilas nun la stelo de Espero... oficiale organizita en la 11ª de novembro 1981. Ni deziras korespondi por interŝanĝi informojn".

● **JUIZ DE FORA** - Prof. José Passini donacis al ni ekzempleron de Bulteno de UFJF - junio/1976, kiu publikigas decidon fare de la Universitata Konsilio (Rezolucio 15/76) kreantan la lernobjektojn Esperanto I kaj Esperanto II. En nia proksima numero aperos intervjuo de tiu s-ano kun detaloj pri la afero.

## RIO DE JANEIRO

● **VOJAĜ-PLANO AL LA 67ª UK** - S-ro Alan Romero organizas naciskalan karavanon, kies partroprenantoj povos viziti ankaŭ Lisbonon, Parizon, Romon, Madridon kaj Londonon. Serĉu prospekton ĉe viaurbaj turismagentejoj aŭ skribu rekte al: TOP FLIGHT TOURS (Rua Visc. Pirajá, 595 S/L 214 - 22410 Rio de Janeiro-RJ) EĈ SE VI NE POVOS PARTOPRENI la 67an.

● **NITERÓI** - La ĉiam entuziasma kaj laborema prezidanto de N.E.K. ofte informas pri ties agado, inkluzive de diskonigo pri la Projekto de Leĝo ellaborita de Dep. Freitas Nobre kaj donaco de pli ol 50 diversaj esperantaĵoj al la E-Fako de la Biblioteko de la Ĉambro de Deputitoj.

● **BRAZILIA ESPERANTO-LIGO** (Praça da República, 54, 2º - 20211 R. Janeiro-RJ) - Represigis la Vortareton de D-ro Carlos Domingues kaj la propagandaĵon "Havi milionon da Amikoj". La interesatoj devas urĝe mendi, ĉar estas malgranda eldono.

● **KULTURA KOOPERATIVO** - Ĉe vizito al ĝia sidejo nia Vicprezidanto povis konstati, ke estas ĉio preta por la Seminario en Uberlandia; en ties oficiala programo estas kunsido de la 3 tutlandaj E-organizoj. Ni iru grandnombre!

• **URBO LIDICE** - Pere de s-animo Izabel Cristina O. Santiago (R. Conde de Bonfim, 214/307 - 20520 R.Janeiro-RJ), Brazila E-Ligo faris tre belan kontakton de la brazila Lidice kun Ĉekoslovakio, memore al la tragedio okazinta en la tiulanda samnoma urbo dum la dua mondmilito (la 10an/junio/1942). Laŭ komuniko de la Ĉekoslovaka Ambasadejo la Ambasadoro mem en oficiala vizito faros valoran donacon al ĝi.

## SANTA CATARINA

• **FLORIANÓPOLIS** - Post kelkjara stagnado la Movado en la ĉefurbo kaj en la tuta ŝtato nun revigliĝas. Pri tio atestas la dua numero de "Antaŭen", bele presita oficiala bulteno de Esperantista Asocio de Santa Catarina (C. Postal 460 - 88000 - Florianópolis-SC), kies portugallingva ĉefartikolo estas tre trafe verkita de s-ano D-ro Walter Boppré.

## REMESSA DE VALORES

Não remeta cheque, vale postal ou ordem de pagamento em nome de qualquer diretor nosso. Ao invés de facilitar, isso dificulta em muito os trabalhos da Tesouraria. No caso de ordens de pagamento ou de crédito, às vezes torna-se dificílimo identificar os remetentes, porque os Bancos não expedem aviso sobre a chegada do numerário ou então o creditam na conta do diretor beneficiário, através de cujo extrato é impossível apurar o nome do remetente da ordem. Caso V.Sa. tenha assim procedido nos últimos meses sem ter recebido até agora o competente comprovante da nossa Tesouraria, pedimos a fineza de nos escrever a respeito, citanto o valor e a data da ordem remetida, o banco interveniente e o nome do diretor beneficiário da remessa.

Em resumo, os donativos, anuidades e quaisquer valores de que sejamos beneficiários devem ser remetidos sempre em nome do Conselho Brasileiro de Esperanto, SCS - Ed. Jocky Club, sala 103, CEP 70.300 - Brasília (DF).

---

*Humila sinkono estas pli certa vojo al Dio, ol profunda esploro de la scienco*



## KIU ESTAS LA PLEJ BONA?

Multaj esperantistoj amas la piedpilkon. Pro tio, la redakcio decidis liveri spacon en sia bulteno, por tuŝi tiklan temon en la piedpilka tereno. Objektive, ni volas scii, kiu estas la plej bona futbalisto en la mondo.

Diego Armando Maradona, argentin devena, 21-jaraĝa, kun knabeca mieno, konsideras sin tia: "Mi estas la plej bona en la mondo, kaj esperas, speciale, konkeri ĉi-jare la Mondan Ĉampionecon en Hispanujo", li deklaris en Valência, antaŭ kelkaj semajnoj.

Ni flankenlasu de la diskutado la reĝon Pelé, pro tio, ke li jam surpendigis siajn futbalŝuojn. Sed ni faros la komparon fronte al la avanulo Zico, tiu humila sed furora golfaranto de la mondfama karioka Klubo Flamengo.

Certe multaj kontraŭuloj kritikos nin, demandante, kial anstataŭ Zico, ne estis menciitaj, ekzemple, Sócrates, Falcão, Rummeniggi, Paolo Rossi, Júnior aŭ aliaj futbalistoj . . .

Estas do konvene konfesi, ke ni grandan sperton ne havas en tiu ĉi metio.

Pro tio, kara leganto, vi kiu ĝuas, aplaŭdas, partoprenas, amas kaj sufiĉe bone konas kiel kompetenta specialisto la futbalon, ĉu vi povas elekti por ni la plej bonan futbaliston de l'mondo en la nuna momento?

## ELSTARAJ HOMOJ KAJ FAKTOJ DE LA JARO 1981

Sorokaba Esperanto-Klubo, unu el la plej aktivaj E-asocioj de nia lando, diskonigis en portugala lingvo jenan liston de la plej elstaraj homoj kaj faktoj de la movado en 1981, laŭ opinio de klera grupo de esperantistoj el Sorocaba:

01 - MAIOR ATIVIDADE DE 1981: O 66º Congresso Mundial de Esperanto;

02 - MAIOR DIVULGAÇÃO DO ESPERANTO: Major Gilberto Silva Velho;

03 - MAIOR PROGRAMA DE ESPERANTO: Klubo de Esperanto-Rádio Clube de Sorocaba;

04 - MELHOR BOLETIM: Do Conselho Brasileiro de Esperanto, então sob redação de Maria Almada;

05 - MAIOR MOVIMENTO FINANCEIRO: Associação Paulista de Esperanto;

06 - COLUNA DE ESPERANTO MAIS COMPLETA: Esperantismo, de "A Gazeta Esportiva";

07 - ESPERANTISTA DO ANO: Prof. Walter Francini, Tradutor Oficial do 66o UK;

08 - MELHOR LIVRO EDITADO ROMANCE RELIGIOSO: De Francisko el Asizo por Vi;

09 - MELHOR LIVRO CULTURAL EDITADO: La Luzidoj;

10 - ALMANAQUE DO ANO: Almanako Lorenz;

11 - SELO ESPERANTISTA DO ANO: O editado para o 66º Cong. Mundial de Esperanto.

12 - CONCURSO DE REDAÇÃO SOBRE A LÍNGUA INTERNACIONAL: Sorokaba E-Klubo;

13 - CONCURSO DE PENSAMENTOS SOBRE O ESPERANTO: Associação Paulista de Esperanto;

14 - MELHOR CURSO DE ESPERANTO: Aŭdu kaj Lernu, de Sylla Chaves;

15 - RÁDIO-AMADOR ESPERANTISTA: G. O. Vaske;

16 - DIVULGAÇÃO DO ESPERANTO NAS ESCOLAS-PROJETO: Sociedade Bauruense de Esperanto;

17 - MELHOR REVISTA: Fonto, de Chapecó, SC.;

18 - CIDADE COM MAIS CURSOS DE ESPERANTO: São Paulo (SP);

19 - ESTADO COM O MAIOR No DE ESPERANTITAS NO 66º UK: Rio de Janeiro-RJ.;

20 - ESTADO QUE CRIOU MAIS ENTIDADES DE ESPERANTO: São Paulo (cidades de Campinas, Tapiraí e BEKO-Em São Paulo);

21 - ESTADO QUE MAIS REALIZOU ENCONTROS ESPERANTISTAS: São Paulo (dois);

22 - MELHORES ESPETÁCULOS ARTÍSTICOS: Grupo da U.F. Alagoas e Grupo Gaúcho de Folclore do Rio Grande do Sul (Apresentação no 66º UK);

23 - MELHOR APRESENTAÇÃO CULTURAL NO EXTERIOR: Ass. Rel. Oomoto Japão, com o apoio de Oomotanos de Jandira-SP;

24 - MELHOR TEATRO: Bejo, Brasília-DF;

25 - MELHOR CONJUNTO MUSICAL: Crisol, de São Miguel Paulista-SP;

26 - CIDADE QUE MAIS CRESCEU EM TERMOS DE ESPERANTO: Brasília-DF;

27 - BOLETIM CATÓLICO: Brazila Katoliko, BEKO - São Paulo - SP;

28 - BOLETINS REGIONAIS DE ESPERANTO: Suda Stelo (ESPA) e Interna Informilo (SEK);

29 - BOLETIM ESPÍRITA QUE MAIS DIVULGOU O MOVIMENTO ESPERANTISTA: SEI, Rio de Janeiro-RJ;

30 - REVISTA ESPÍRITA QUE MAIS DIVULGOU O ESPERANTO: Reformador, Rio e C.I.E., Matão-SP;

31 - MAIOR BIBLIOTECA DE ESPERANTO: Brazila Esperanto-Ligo;

32 - MELHOR TRADUÇÃO MUSICAL: La Paloma (Kanto de l'Maristo), por Sylla Chaves;

33 - CIDADE COM MAIOR NÚMERO DE DELEGADOS DA UEA: Rio de Janeiro - RJ;

34 - XADREZ: Ŝaka Esperanto-Klubo;

35 - MELHOR CANTOR: Joel de Castro;

36 - MELHOR CANTORA: Franca Fenati;

37 - MELHOR TESOUREIRO: Carlos A. S. da Cunha - LKK 66º UK;

38 - MELHOR DISCURSO SOBRE O ESPERANTO: Pelo Dr. Aureliano Chaves (66º UK);

39 - SENADOR QUE DIVULGOU O MOVIMENTO: Dr. José Lins de Albuquerque (LKK);

40 - DATA DE MAIOR DIVULGAÇÃO DO MOVIMENTO: 15 de dezembro, Dia de Zamenhof.



Centro de Cópias Cerqueira Campos e Imprimiu